



Saluton!

Dum nia landa kunveno, NJE-membroj elektis novan estraron. Alvenis novaj membroj kaj eliris malnovaj membroj. Mi dankegas al Leif Arne por multaj jaroj kiel prezidanto kaj estrarmembro en la NJEa universo! Samtempe, mi bonvenigas la novajn membrojn kaj antaŭĝojas al estrarlaboro. Se vi havas ion pri kio la estraro devus diskuti aŭ simple scii, ne hezitu kontakti nin. Eble vi havas bonajn ideojn por venonta kunveno?

Amelie



inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Amelie Matt – Muntis: jpa

Raporto de la landa kunveno de NJE 2013

Loko: Haraldsheim vandrerhjem, Oslo

Dato: 15.06.2013

Ĉeestaj membroj: Leif Arne Storset, Amelie Matt, Hilde Lagnason Bye kaj Jon Machlik
Ĉeestis ankaŭ du ĵurnalistoj dum la landa kunveno, kiuj fotis kaj intervjuis.

1. MALFERMO

La prezidanto malfermis la kunvenon.

2. APROBO DE ALVOKO

La ĉeestaj membroj aprobis la alvokon.

3. ELEKTO DE KUNVENA PREZIDANTO KAJ RAPORTANTO KAJ DU SUBSKRIBANTOJ DE KUNVENA PROTOKOLO

Elektita kunvena prezidanto: Leif Arne Storset

Elektita raportantino: Amelie Matt

Elektita subskribintoj: Hilde Lagnason Bye kaj Jon Machlik

4. RAPORTOJ PRI AGADO KAJ EKONOMIO POST LA PASINTA LANDA KUNVENO

Prezentado de du lastaj jarraportoj (2011 kaj 2012), kaj de ĉi-jara aktiveco

La ĉeestaj membroj aprobis la jarraportojn de 2011 kaj 2012.

La prezidanto raportis de la aktivecoj en 2011

Prezento de ekonomia stato dum la sama periodo

La ĉeestaj membroj aprobis la jarkalkulon de 2011 kun malgranda ŝango (tajperaro). La ĉeestaj membroj aprobis la jarkalkulon de 2012 kun malgrandaj ŝangoj:

Innkommer

Arrangement (Nordluma renkontiĝo)
Støtte (Uhlen-fond og medlemspenger (3740,-))

Utgår

Arrangement (Nordluma renkontiĝo, samling i Østfold)

5. PROPONOJ

Ne estis proponoj.

6. ELEKTOJ

La ĉeestaj membroj elektis je prezidant(in)o: Amelie Matt (nova posteno)
vicprezidanto: Vidar Skretting (nova)
sekretario: Kristoffer Haug (nova posteno)
kasisto: Hilde Lagnason Bye (reelektita)

estrarano: Jon Machlik (nova, elektita post propono dum la jarkunveno)

revizoro: Ulf Stenhaug
vivrevizoro: Kjell Heggvold Ullestad

La jarkunveno ne povis trovi kandidatojn por la elekta komisiono kaj rekomendas al la estraro elekti tiajn, kiam taŭgaj kandidatoj montriĝos.

7. PLANOJ POR LA KOMENCIĜONTA LABORPERIODO (2 JAROJ)

Mojosa vespero je nova tago: la lasta mardo monate

Venontaj datoj: 24.06 (lundel), 27. 08.

Venonta NJE-kunveno: Nordluma renkontiĝo II apud Tromsø vintre 2013/14
venonta estrarkunveno: la unua semajno septembre.

Pensoj: malfermi NJE-liston por interesuloj, pli aktivi en Vizaĝlibro kaj sur la retpaĝo

8. FERMO

La prezidanto fermis la kunvenon.

PONDUS

© Overli. distr. strandoverli@yahoo.com

